La lingva situacio en Svedio kaj Finnlando

Prelego ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Tel-Avivo 2000 07 30

Kontribuaĵo al la kongresa temo *Lingvo kaj kulturo de paco*

Christer Kiselman

Enhavo:

1. Enkonduko
2. La ĉefaj lingvoj en Svedio kaj Finnlando
3. La sveda
4. La finna
5. La tornivala finna
6. La samea
7. La romaa
8. La jida
9. La alandaj insuloj 1917–1921
10. Opinioj, tezoj, konkludoj
Referencoj

1. Enkonduko

Mi kore dankas al Boris Kolker pro la invito prelegi ĉi tie. Ni konas unu la alian ekde 1989, kiam mi vizitis lin en Ufa, Baŝkirio, kaj post lia transloĝiĝo en Usonon ni havis daŭran kontakton, ĉefe per la retpoŝto. Li petis min trovi temon pri lingvo kaj paco. Mi respondis ke mi ne estas specialisto pri paco . . . mi vivas en paco sed ne bone konas la problemojn de Unuiĝintaj nacioj kaj aliaj organizaĵoj kiuj laboras por paco. Tamen li aprobis mian proponon pri temo, do ke mi parolu pri la lingva situacio en Svedio kaj Finnlando [mapo de la du landoj; mapo kun la geografia distribuo de kelkaj el la tie parolataj lingvoj].[1] Ĝi fakte estas interesa ankaŭ el la vidpunkto de paco. En Finnlando la lingva demando ĉiam estas aktuala. Kaj estas tiel ke pri lingvoj okazis aferoj lastatempe en Svedio.

Centoj da lingvoj estas parolataj en tiuj du landoj . . . same kiel en multaj aliaj landoj. La plej parolataj lingvoj estas la sveda kaj la finna. La samea, la lingvo meänkieli, alinome tornivala finna, la romaa [alinome la romna aŭ romaneo] kaj la jida estas aliaj lingvoj pri kiuj mi iom parolos.

Por lingve difini min mi diru ke mi estas denaska svedparolanto – mi naskiĝis en Stokholmo, la ĉefurbo de Svedio. Mi ne parolas la finnan lingvon, sed mi estas ofte en Finnlando (ekzemple lastsemajne ĉe KEF, la Kultura esperanto-festivalo), kaj pro tio iom konas finnajn vortojn.

2. La ĉefaj lingvoj en Svedio kaj Finnlando

Por doni al vi ideon pri la nombro de parolantoj mi citas el *SIL International* (retpaĝo).

[1]En la prezento mi montris plurajn bildojn kiuj ne estas enkluditaj en tiu ĉi teksto. Aliflanke kelkaj pecoj de la teksto ne povis esti prezentitaj pro tempomanko.

lingvo	*en SE*	*en FI*	*en SE kaj FI*	*tutplanede*
sveda (sv)	7 825 000	296 000	8 121 000	9 000 000
finna (fi)	300 000	4 700 000	5 000 000	6 000 000
norda samea	5 000	1 600	6 600	16 600
suda samea	2 500		2 500	5 000
lulea samea	2 000		2 000	2 000
pitea samea	1 000		1 000	1 000
umea samea	500		500	500
skolta samea		500	500	1 000
inara samea		400	400	400
samea, *sume*	11 000	2 500	13 500	26 500
kalea-finna romaa	1 000–2 000	4 000–6 000	5 000–8 000	5 000–8 000
valaka romaa	1 500			1 500 000
estona (et)		6 000	6 000	1 100 000
karelia		10 000	10 000	128 000
liva		kelkaj	kelkaj	80 000
sveda gestlingvo	8 000		8 000	8 000
finna gestlingvo		5 000	5 000	5 000
skandinava piĝina gestlingvo				

Tamen multaj aliaj lingvoj estas parolataj en la du landoj. La supra listo mencias nur tiujn kiuj estas sufiĉe malnovaj en la landoj. En SIL la sekvaj estas menciitaj kun nombro de parolantoj en Svedio: serbo-kroata 120 000, estona 60 000, greka 50 000, dana 35 000, okcidenta persa 35 000, norvega 28 000, turka 20 000, turoja 20 000, kurmanĝi 10 000, latva 6 000 kaj multaj aliaj. Por Finnlando estas listigaj, krom tiuj en la tabelo: rusa 10 000, angla 4 500, somala 1 300, rumana 1 000, [miŝer-]tatara 1 000, turka 1 000. Kaj tiuj ciferoj el 1996 jam konsiderinde ŝanĝiĝis . . . . Mi ja ne povas paroli pri ĉiuj tiuj lingvoj ĉi tie.

Oni povas rapide ekhavi ideon pri la parenceco de la lingvoj el la jena tabelo (Mark Rosenfelder, retpaĝo).

eo	*sv*	*romaa*	*fi*	*meänkieli*	*nordsamea*	*sudsamea*
unu	ett	ek’	yksi	yks	okta	âkxte
du	två	dui	kaksi	kaka	guokte	kuokxte
tri	tre	trin	kolme	kolme	golbma	kul’me
kvar	fyra	štar	neljä	neljä	njeallje	niel’je
kvin	fem	pamž	viisi	viiv	vihtta	viiote
ses	sex	šov	kuusi	kuus	guhtta	kuuote
sep	sju	efta	seitsemän	seittemän	čieža	t’shiit’she
ok	åtta	oxto	kahdeksan	kaheksan	gávcci	kàkxtsie
naŭ	nio	en’a	yhdeksan	yheksän	ovcci	ukxtsie
dek	tio	deš	kymmenen	kymmenen	logi	lyokie

Ni vidas el tiu tabeleto ke la sveda kaj la romaa estas hind-eŭropaj, dum la finna kaj tornivala finna estas inter si tre similaj; la samea estas klare parenca al la finna. La sameaj numeraloj de unu ĝis sep similas al la finnaj, dum oni diras “du de dek” kaj “unu de dek” en la finna por ok kaj naŭ.

Ekzistas en Finnlando pli da saŭnoj ol homoj. La vorto *saŭno*, de la finna *sauna*, juste eniris esperanton.

Unu vorto de la samea eniris esperanton: *boaco*, venanta de la samea *boazo*, la plej grava besto en la tradicia samea vivo.

Laŭ mia scio neniu vorto de la sveda eniris esperanton. Tamen la vorto *ju* estas la sama en la du lingvoj: *ju* ... *desto* 'ju ... des'. Mi ne pensas ke la esperanta *ju* estas prenita el la sveda. La germana *je* ... *desto* kredeble fariĝis *ju* ... *des* en esperanto por eviti kolizion kun la prepozicio *je*. Sed se neniu sveda vorto eniris esperanton tio tamen ne implicas ke esperanto kaj la sveda estas foraj unu de la alia. La jida kaj la sveda estas proksime parencaj, kaj, kiel ni scias, la jida multe influis esperanton.

Lingvaj rajtoj

La kvin nordiaj landoj, do Danlando, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio, subskribis lingvan konvencion en 1987 laŭ kiuj civitanoj en tiuj kvin landoj havas la rajton uzi sian lingvon en kortumoj kaj diversaj oficialaj cirkonstancoj en ĉiuj kvin landoj.

La Konsilio de Eŭropo, organizaĵo kun kvardek unu membroŝtatoj, ellaboris du konvenciojn: *La Eŭropa ĉarto por regionaj aŭ malplimultaj lingvoj*[2] (1992) kaj *La Kadra konvencio por la protektado de naciaj malplimultoj*[3] (1995). Finnlando ratifikis la unuan kun valideco ekde 1998 03 01, la duan kun valideco ekde 1998 02 01, Svedio ratifikis ambaŭ kun valideco ekde 2000 06 01. Male, nek Svedio nek Finnlando ratifikis *La Konvencion por indiĝenaj kaj tribaj popoloj*[4] (1989) de la Internacia labororganizaĵo (fondita en 1919, ekde 1946 agentejo de la Unuiĝintaj nacioj). Ĝi postulas protekton de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, evidente ĝis tro alta grado por la du ŝtatoj.

Estas rimarkinde ke ekzistas en Svedio multe pli da parolantoj de la greka, ekzemple, ol de la samea. Kaj tamen oni ne konsideras la grekparolantojn kiel malplimulton. Oni do iel difinas la nocion de tradicia, aŭ sufiĉe malnova, malplimulto, kaj poste listigas nur tiujn ĉi. Sed malantaŭ tiu sinteno kuŝas akra problemo ... ni revenu al ĝi.

3. La sveda

La sveda lingvo apartenas al la hindeŭropaj; pli precize ĝi estas ĝermana lingvo proksime parenca (kun reciproka komprenebleco) al la norvegaj kaj dana lingvoj. Parencaj estas ankaŭ la islanda kaj feroa, kaj pli malproksime parencaj la germana kaj angla lingvoj.

Parolas la svedan ĉirkaŭ naŭ milionoj da personoj, loĝantaj en Svedio kaj (ĉ. tricent mil) en Finnlando. Laŭ SIL International (retpaĝo) ĝi estas la 89-a lingvo laŭ nombro de parolantoj.

[2] *European Charter for Regional or Minority Languages* (ETS No. 148).
[3] *Framework Convention for the Protection of National Minorities* (ETS No. 157).
[4] *Indigenous and Tribal Peoples Convention, No. 169.*

Vortkunmeto

La sveda kunmetas vortojn proksimume laŭ la samaj reguloj kiel esperanto, sed oni ofte formas pli longajn vortojn ol en esperanto. Ekzemplo: *bokhandelsföreståndare* 'estro de librovendejo', kiun oni povas analizi tiel:

bok	*handel*	*s*	*före*	*stånd*	*-are*
libro	butiko	-	antaŭ	staro	-anto

Prononco

La sveda havas du tonojn en sia prononco, do melodian akcenton, kiu distingas vortojn. La norvega ankaŭ havas tion; la ĉina kaj la vjetnama havas pli da tonoj. Almenaŭ tio veras por la sveda en Svedio; en partoj de Finnlando tiu muzika akcento ne ekzistas. Oni do distingas inter *steg-en* 'la paŝoj' kaj *stege-n* 'la ŝtupetaro'; inter *and-en* 'la anaso' kaj *ande-n* 'la spirito'. Ĉu vi aŭdas la diferencon?

La sveda havas multajn vokalfonemojn, proksimume[5] dek ok: naŭ longajn kaj la respondajn mallongajn. Ekzistas facile troveblaj minimumaj paroj por ĉiuj dek ok vokalfonemoj. Oni distingas inter *fira* 'celebri', *fyra* 'kvar', *fura* 'pino', *fora* 'forumoj', kvar vokalfonemoj en kvar tute malsamaj vortoj. Do la svedaj vokaloj loĝas iom dense en la vokala spaco, kio kaŭzas problemojn por plenkreskuloj kiuj lernas la lingvon. La longo de vokaloj estas grava: oni distingas *vit, vitt*; *red, redd*; *lam, lamm*; *rådig, råddig*; *bot, bott*; *ful, full*; *byta, bytta*; *söt, sött*; *är, ärr.*

La vortordo estas malfacila. Estas kruela fakto ke ekzistas multaj personoj kiuj vivis en Svedio dum dudek jaroj kaj tamen ne kapablas senerare diri: "Li diris ke li ne scias", ĉar la vortordo estas alia en subordigita propozicio, do post *ke.*

Antaŭ mil jaroj oni skribis la svedan per runoj, malnova alfabeto, kiun mi montras ĉi tie [runa alfabeto, runŝtonoj].

La sveda estas unu el la oficialaj lingvoj de Finnlando kaj de la Eŭropa unio. Ĝi ne havas oficialan statuson en la svedia leĝaro. Ekzemple la ĉefa svedia konstitucia leĝo (Svedia parlamento 1974) ne mencias ion pri la statuso de iu ajn lingvo.

En la svediaj universitatoj oni ĝenerale instruas per la sveda. Sed ne ĉiam: lekcioj estas ofte en la angla, ĉu pro tio ke la instruisto ne sufiĉe bone konas la svedan, ĉu pro tio ke ĉeestas studento kiu ne scipovas la svedan. La sveda estas lingvo de plimulto en Svedio, sed en la monda vilaĝo ĝi estas lingvo de malplimulto. Jam delonge oni ne publikigas altnivelajn sciencajn studojn en la sveda. La lingvo fakte ne posedas sciencajn terminojn en la plej altaj niveloj de kelkaj sciencoj. La situacio rilate al la scienca lingvaĵo komencas simili al tiu de la jida, la samea, la romaa ... kaj de esperanto, kiuj ĉiuj estas lingvoj de malplimultoj ne forte apogataj de iu ŝtato.

Propono pri aga programo por la sveda lingvo

La Sveda lingvokomitato ricevis en aprilo 1997 komision de la svedia registaro ellabori proponon pri aga programo por akceli la svedan lingvon. Jam en marto 1998 la komitato sendis sian raporton al la registaro (Svenska språknämnden 1998).

[5]Mi diris "proksimume", ĉar la nombro de fonemoj ne estas la sama en ĉiuj svedaj dialektoj. Priskribo de iu "nacia" aŭ "norma" sveda kaj priskribo de iu sveda dialekto tial malsamas je la fonema nivelo.

La ĉefa propono de la komitato estas ke la statuso de la sveda lingvo estu leĝe fiksita de la ŝtato (kiel mi menciis, tio ne okazis en Svedio, sed jes ja en Finnlando). Oni krome proponas plurajn farojn por plibonigi la statuson de la sveda, ekzemple ke oni devas garantii ke la sveda daŭre estos oficiala lingvo de la Eŭropa unio; ke Svedio devas labori por parte novaj reguloj kaj gvidlinioj por la tradukaj servoj de EU; ke patentpriskriboj estu disponeblaj en la sveda;[6] ke la lingvo de altlerneja edukado en Svedio normale estu la sveda; ke televidaj kaj radiaj kanaloj havu sufiĉan onon de svedlingvaj programoj. Ĉiuj punktoj menciitaj temas do pri la t.n. statusa planado de la lingvo. En nur unu punkto oni mencias korpusan planadon, nome ke la laboro pri plurlingva terminologio ricevu pli da mono. Oni atendas ke la registaro baldaŭ nomumos *ad-hoc*-komisionon por prepari rekomendojn rilate al lingva politiko. Estas tro frue diri kio estos la rezulto de la laboro de la komisiono.

4. La finna

La finna estas finn-ugra lingvo. Ĝi estas proksime parenca al la estona, iom malpli al la samea kaj la mordva, al aliaj lingvoj parolataj en Ruslando – kaj tre fore parenca al la hungara. Ni vidu mapon de la uralaj lingvoj, kaj diagramon kiu montras parencecon.

La finna estas parolata de proksimume 5 milionoj da personoj en Nordio. Ili loĝas plejparte en Finnlando, sed proksimume tricent mil aŭ kvarcent mil loĝas en Svedio. El ili multaj loĝas tie ekde miloj da jaroj (en la norda parto de Svedio), aliaj ekde kelkaj jardekoj (ĉefe en urboj).

Riĉa je vokaloj

La finna enhavas multe da vokaloj. Laŭ statistiko la finna enhavas pli da vokaloj ol konsonantoj, la sola kun tiu eco en la listo:

lingvo	*procentaĵo de vokaloj*
finna	51
itala	47,74
novgreka	46,61
serbokroata	46,47
rumana	45,04
latino	44
slovaka	43,82
franca	43,36
esperanto	43
hungara	41,91
sveda	41
ĉeĥa	40,73
usona angla	37,4
germana	38,86

[6] Tiu estas tute aktuala demando, ĉar ekzistas propono ke patentpriskriboj estu validaj en Svedio sen priskribo en la sveda. Oni ankoraŭ ne scias kiel estos pri tiu punkto.

Por mi la finna estas tre bela lingvo, kaj mi pensas ke tio estas ligita al la fakto ke ĝi enhavas tiom da vokaloj. Se la ono de vokaloj estas mezuro, ĝi estas pli bela ol la itala.

La finna distingas inter longaj kaj mallongaj vokaloj, same kiel la sveda, sed ankaŭ inter longaj kaj mallongaj konsonantoj. Mi mem havas malfacilaĵon fari tiun distingon; do mi ne bone prononcas la ekzemplojn menciotajn: *tuli* 'fajro'; *tuuli* 'vento'; *tulli* 'dogano'. Kaj la distingo inter longaj kaj mallongaj vokaloj aperas ankaŭ en neakcentitaj silaboj, male al la sveda. Ekzemplo de minimuma paro estas: *tapan* 'mi mortigas'; *tapaan* 'mi renkontas'.

La substantivoj en la finna havas multajn kazojn. Ni prenu la ekzemplon de *kauppa* 'butiko':

	singularo	*pluralo*	*klarigo*
nominativo	kauppa	kaupat	difinita kvanto
genitivo	kaupan	kauppojen	rilate al
partitivo	kauppaa	kauppoja	nedifinita kvanto
inesivo	kaupassa	kaupoissa	en
elativo	kaupasta	kaupoista	el
ilativo	kauppaan	kauppoihin	en -n
adesivo	kaupalla	kaupoilla	ĉe, kun, sur
ablativo	kaupalta	kaupoilta	de
alativo	kaupalle	kaupoille	al
esivo	kauppana	kauppoina	funkcias kiel
translativo	kaupaksi	kaupoiksi	transformita en
komitativo	kauppoineen	kauppoineen	kune kun
abesivo	kaupatta	kaupoitta	sen

Sintezemo

La finna ofte esprimas komplikajn frazojn per unu vorto. Ekzemplo estas *taloissammekin* 'ankaŭ en niaj domoj', kiun oni povas analizi tiel:

talo	*-i-*	*-ssa-*	*-mme-*	*-kin*
domo	-j	en	nia	ankaŭ

Pruntoj inter la sveda kaj finna

sv	signifo	*direkto*	*fi*	*signifo*
(pravorto de) köpa	aĉeti	→	kauppa	komerco, butiko
(pravorto de) såpa	(mola) sapo	→	saippua	sapo
pojke	knabo	←	poika	knabo
kola	morti	←	kuolla	morti

La sonoj de *kauppa* kaj *saippua* montras ke ili eniris la finnan jam en la mezepoko.

El la historio

1809 03 29 Finnlando fariĝas granddukejo. La grandduko estas la caro de Ruslando; do estiĝas unio de Finnlando kaj Ruslando kun komuna ŝtatestro. La caro deklaras ke Finnlando altiĝis al la rango de nacio. Kiam la caro en ceremonio ricevas la ĵuron de fideleco de la finnlanda gvidantaro, li parolas france. La parolado estas tradukita en la svedan. Ne ekzistas regnolimoj inter Alando kaj Alasko ĝis 1867; post 1867 al la markolo de Bering. Iu diris ke Finnlando estas kunlaborema, Pollando ribelema.

1850 Unua profesoreco pri la finna lingvo ĉe la Universitato de Helsinki. Dum la tuta jarcento la finna lingvo estas evoluigita kaj normigita; oni unuigas ĝis certa grado okcidentajn kaj orientajn dialektojn. La lingvo ricevas pli altan statuson en la granddukejo. La deknaŭa jarcento estas periodo de grandega ŝanĝo de la statuso kaj korpuso de la finna.

1902 La finna plene egaligita kun la sveda en Finnlando.

1906 La virinoj en Finnlando ekhavas la rajton voĉdoni – la unuaj en Eŭropo. Ili samtempe ricevas la rajton esti elektitaj kiel membroj de la granddukeja parlamento.

1917 08 20 Alando postulas aliĝon al Svedio.

1917 11 07 La Oktobra revolucio en Ruslando.

1917 12 06 Finnlando sendependiĝas.

1919 La finna kaj la sveda estas deklaritaj oficialaj lingvoj de Finnlando.

1922 Lingva leĝo garantias la uzadon de la sveda en la centra administrado.

1934 Propono pri 21 svedlingvaj profesorecoj en la Universitato de Helsinki estas kontraŭita de la parlamento.

1937 15 svedlingvaj profesorecoj en la Universitato de Helsinki estas akceptitaj.

1944 La ŝtatministro Paasikivi proponas leĝan artikolon por minimumigi la ekloĝadon de kareloj en svedlingvaj regionoj. Li sukcesas persvadi la oponantojn.

1995 12 31 La loĝantaro de Finnlando estas 5 116 826, el kiuj 294 664 aŭ 5,8 % estas registritaj kiel svedlingvanoj.

2000 04 01 Svedia leĝo ekvalidas laŭ kiu la finna kaj meänkieli estas oficialaj lingvoj de Svedio. Oni rajtas uzi ilin en la kortumoj kaj en la administrado en kvin komunumoj en Svedio: Gällivare, Haparanda, Kiruna, Pajala kaj Övertorneå. Kune tiuj kvin komunomuj havas 73 700 loĝantojn kaj areon de 46 602 km^2 (pli ol duoble la areo de Israelo).

5. La tornivala finna

Kiam Svedio estis dividita en 1809 oni ne sekvis la lingvajn limojn. La alandaj insuloj estis svedlingvaj kaj iris al la graddukejo, kaj en la nordo la ŝtatlimo estis metita oriente de la lingvolimo, tiel ke granda areo loĝata de finnlingvanoj apartenis al Svedio [mapo]. Tiel la finna lingvo en la norda parto de Svedio dum preskaŭ ducent jaroj estis izolita ĝis certa grado.

La finna en la svedia ŝtato estis mistraktata. La medio de instruado estis la sveda, ne la finna, kaj la geknaboj estis punataj se ili parolis la finnan, eĉ dum paŭzoj en la lernejo. Kaj la terminoj de la moderna administrado estis laŭ la svedia ŝtato, ne laŭ la finnlanda granddukejo kaj poste ŝtato. Tio signifas ke la tornivala finna okcidente de la rivero Tornio, kiu estis kaj ankoraŭ estas la limo, evoluis en alia direkto ol la finna oriente de la rivero, kvankam en 1809 la lingvo estis absolute la sama ambaŭflanke de la rivero. Estis unu rivera valo kun unu lingvo kaj unu kulturo.

Ĉu do ducent jaroj sufiĉas por krei novan lingvon? Interesa demando. La lingvistoj multe esploris tion. El la tornivalanoj mem duono opinias ke ilia lingvo estas aparta lingvo. Oni finfine rekomendis ke la tornivala finna estu konsiderata kiel alia lingvo ol la finna. Kaj la svedia ŝtato, per sia leĝo ekvalidanta je 2000 04 01, aprobis tion, ĉar la leĝo mencias la finnan kaj meänkieli kiel du apartajn lingvojn.

Ni rigardu kelkajn nomojn de birdoj.

eo	*sv*	*fi*	*meänkieli*
akcipitro	hök	haukka	haukka
korvo	korp	korppi	korppi
merlo	koltrast	mustarastas	mustarastas
korniko	kråka	varis	vares
pigo	skata	harakka	harakk
tetro	orre	teeri	teiri
apuso	tornsvala	tervapääsky	tuurnsvaala
muŝkaptulo	flugsnappare	sieppo	flyyksnappari
muta garolo	lavskrika	kuukkeli	kuukkeli, laavskriikka
pirolo	domherre	punatulkku	tuomiherra
frugilego	råka	mustavaris	–
monedo	kaja	naakka	–
pandiono, fiŝaglo	fiskgjuse	kalasääski	–

Ni vidas ke en la tri unuaj kazoj la tornivala vorto estas identa al la finna; en la tri sekvaj preskaŭ identa. En la postaj kvar kazoj la tornivala pruntas el la sveda. Fine, la tri lastaj birdoj ne aperas nature en la valo de la rivero Tornio kaj ili pro tio ne havas nomon en meänkieli – ili ja povus havi klerajn nomojn. Analoge statas pri beroj kaj fiŝoj (mi havas tabelojn kiujn mi ne montras) kaj pri administraj aferoj – dum ducent jaroj la du regionoj estis ligitaj al malsamaj registaroj.

6. La samea

La samea estas parolata en la nordaj partoj de Norvegio (kie loĝas duono de ĉiuj sameoj aŭ laponoj), Svedio (kie loĝas triono), Finnlando kaj Ruslando. Ĉu ĝi estas unu lingvo dividita en plurajn dialektojn? Aŭ ĉu temas pri pluraj lingvoj? Se tiel, kiel difini ilin? Jen interesegaj demandoj. [Ni rigardu mapon.] Ĝenerale dirite apudaj variantoj estis interkompreneblaj, sed neapudaj ne. Do sudsameparolanto apenaŭ komprenas la nordsamean kaj tute ne la skoltsamean. Spite al tio, oni plej ofte parolas pri *la* samea kiel unu lingvo.

Ni vidis la nombron de parolantoj en Svedio kaj Finnlando. En Norvegio la samea estas pli forta, kun duono de la tuta parolantaro. Kautokeino, alinome Guovdageaidnu, estas la ĉefurbo de Laponio, Samelando. En Ruslando la samea estas tre malforta. La tersamea estas parolata de proksimume dudek personoj, el kiuj la du plej junaj estas naskitaj en 1939. Oni komprenu kion tio signifas.

Ni vidis la numeralojn, kiuj ja indikas parencecon inter la finna kaj la samea. Ni menciu ankoraŭ du vortojn kiuj montras tiun parencecon:

eo	*sv*	*fi*	*nordsamea*
naturo	natur	luonto	luondu
tago	dag	päivä	beaivi

La sameoj mem taksas al okdek kvin mil la nombron de sameoj en la tuta Samelando, el kiuj dudek mil logas en Svedio. Tamen multaj el ili ja ne parolas la samean. En Finnlando ili estas sep mil. Nur dek procentoj de la sameaj familioj en Finnlando vivas per boacbredado. La Finnlanda statistika centro registris mil sepcent dek ses personojn kun la samea kiel gepatra lingvo je 1998 01 01. Tamen la Samea parlamento en Finnlando asertas ke ili estas du mil kvincent. Kiam Finnlando ratifikis la lingvan ĉarton ETS No. 148, la ŝtato faris kvindek naŭ promesojn rilate al la samea lingvo.

En Norvegio la samea farĝis oficiala lingvo en 1992, samjare en Finnlando. En Svedio 2000.

En ĉiuj tri landoj ekzistas t.n. Sameaj parlamentoj, kiuj havas tre limigitan potencon. Ne temas pri iu parlamento de la popolo – la tri ŝtatoj ja havas siajn tri parlamentojn. La Samea parlamento en Svedio ekzistas ekde 1992; tiu en Finnlando ekde 1996, sed jam ekde 1973 oni havis delegacion kun simila statuto.

La svedia ŝtato longe ne agnoskis siajn malplimultojn. Oni havis kaj ankoraŭ havas leĝon pri la bredado de boacoj; la boacposedantoj ricevas tie certajn rajtojn, fonditajn sur malnovega tradicio – laŭ la samea tradicio, same kiel ĉe la indianoj en Ameriko, oni ne povas posedi teron, kio evidente kolizias kun la sistemo de Svedio, laŭ kies leĝoj oni jes povas posedi teron. Tio estas ege serioza, ege longedaŭra konflikto inter la svedia ŝtato kaj la sameoj. Tiu politiko signifas ke oni identigas la sameojn kun certa profesia grupo inter ili; la sameoj kiuj ne posedas boacojn ĝis nun ne havis iujn ajn specialajn rajtojn.

La svedia ŝtato ĝis tiu ĉi jaro ne agnoskis iujn rajtojn de malplimultoj – oni jes ja agnoskas ĉies individuajn rajtojn, sed ne la rajtojn de etnaj grupoj, nek, tradicie, ties lingvojn. Nun okazas tamen iuj ŝanĝoj rilate al malplimultoj kaj iliaj lingvoj en Svedio. Nome, Svedio antaŭnelonge, tre malfrue, ratifikis la du konvenciojn de la Konsilio de Eŭropo. Per tiu ago la ŝtato donas specialan protekton al la samea, la finna, kaj al meänkieli, konsiderante la lastan kiel apartan lingvon. Ili estas teritorie difinitaj lingvoj. Du aliaj lingvoj, la romaa kaj la jida, kiuj ne estas teritoriaj, ricevas malpli fortan protekton. Estas ankoraŭ tro frue diri kiuj estos la praktikaj sekvoj de tiuj decidoj.

Svedia leĝo ekvalidis la 1-an de aprilo 2000 laŭ kiu la samea fariĝis oficiala lingvo de Svedio, kaj povas esti uzata de unuopuloj kontakte kun kortumoj kaj administraj aŭtoritatoj en kvar komunumoj: Arjeplog, Gällivare, Jokkmokk kaj Kiruna (ni notu ke Gällivare kaj Kiruna estas menciitaj ankaŭ en la leĝo pri la finna kaj meänkieli). Kune tiuj kvar komunumoj estas loĝataj de 59 083 personoj kaj havas areon de 67 862 km^2 (pli ol trioble la areo de Israelo). Estas rimarkinde ke la leĝo mencias nur la samean sen iu mencio de variantoj aŭ dialektoj; la sola ebleco interpreti ĝin estas ke ĝi validas por ĉiuj variantoj de la samea parolataj en Svedio – kio certe kaŭzos praktikajn problemojn.

7. La romaa

La romaa estas hind-eŭropa lingvo, kiu estas parolata en multaj dialektoj – Hyltenstam (1999:261) diras pli ol sesdek. La unuaj romaoj [alinome ciganoj] alvenis al Svedio en la komenco de la deksesa jarcento. En la deksepa jarcento oni pelis ilin al la orienta parto de la regno, do al Finnlando. Nun la lingvo kalea romaa estas parolata de kvarmil ĝis sesmil personoj en Finnlando kaj de mil ĝis dumil en Svedio – laŭ SIL. Valaka romaa estas parolata de mil kvincent personoj en Svedio. Trimil finnlandaj romaoj loĝas en Svedio. Pro migrado el Balkanio pli da romaoj ol iam ajn nun loĝas en Svedio. Oni taksas al dekkvin mil ĝis dudek mil ilian nunan nombron. Sed ĝis kiu grado ili parolas la romaan, kaj kiujn dialektojn ili parolas estas ege malfacile determinebla. Estas menciinde ke etna aparteneco kaj lingvaj kapabaloj ne estas registritaj en Svedio. Oni tial povas nur taksi ĉiujn ĉi nombrojn.

En Finnlando ekzistas proksimume dek tri instruistoj pri la romaa. Dum la lerneja jaro 1998/99 proksimume ducent tridek infanoj ricevis instruadon pri la romaa (el mil kvincent romaaj infanoj en lerneja aĝo).

La romaoj tipe estas du- aŭ plurlingvaj. Ili ĉiam povis komuniki kun la ĉirkaŭanta socio. Ilia lingvo, la romaa, estis pli "identecapoga ol informtransiga" laŭ la vortoj de Hyltenstam (1999:243).

Kaj Svedio kaj Finnlando deklaris ke la romaoj estas malplimulto al kiu oni aplikas la garantiojn de la du konvencioj.

Post kvincent jaroj da diskriminacio la romaa kulturo ĉijare ricevis iom da agnosko fare de la svedia ŝtato.

La romaa nemalmulte influis la slangan svedan. Mi listigas svedajn slangvortojn kun ilia signifo en esperanto, kaj kun ili romaa origino kaj la signifo de la origina vorto.

sv slango	*signifo*	*romaa origino*	*signifo*
beng	diablo; stulta	beng	diablo
haja	kompreni	haćar-	kompreni
jycke	hundo	džukel	hundo
kirra	fari, ripari	ker-	fari
lattjo	amuza	lačho	bona, bela
mucka	liberiĝi (de militservo)	muk-	forlasi, liberigi
pral	frato	phral	frato, kuzo
pröjsa	pagi	prejs-	pagi
tjabo	knabo, ulo	čhavo	knabo, filo
tjej	knabino, juna virino	čhej	knabino, filino
tji	nenio	či	ne (negacio)
vischan	la kamparo	veš	arbaro, monto

Mi povus listigi multe pli. Kelkaj slangaj vortoj eble nun ne estas uzataj, sed estis uzataj en mia infaneco – tiajn vortojn mi ne listigis; mi limigis min al vortoj kiuj estas nuntempe multe uzataj en la parola sveda. La plej ofta vorto el ĉiuj estas *tjej*, kiu fariĝis la kutima vorto por knabino kaj (iom) juna virino. La vorto ekzistas kiel sveda vorto ekde 1847. Kiam mi estis infano, oni konsideris ĝin pejorativa, eble pro tio ke oni konsciis pri ĝia origino ĉe malŝatata popola grupo. Sed nun ĝi absolute ne estas pejorativa aŭ malŝata; tute male, se oni hezitas inter la nomado de virino per *tjej* aŭ per sinjorino, oni elektu la unuan, ĉar ĝi implicas junecon, nuntempe granda socia valoro. Ĝi do estas ekzemplo de vorto kies socia statuso rimarkinde altiĝis dum kvindek jaroj.

8. La jida

La unuaj judoj alvenis al Svedio en la deksepa jarcento. Pro la religia politiko de Svedio ili ne rajtis loĝi kie ajn. Ni rigardu kelkajn punktojn el la historio:

1782 Judoj rajtas ekloĝi en tri urboj de Svedio: Stokholmo, Gotenburgo kaj Norrköping, sekve tute ne en Finnlando. Tamen dum la 19-a jarcento judoj escepte rajtis loĝi en Finnlando, ĉar ili transloĝiĝis de Ruslando.

1870 Judoj ricevis plenajn civitajn rajtojn en Svedio. (Sed plena libereco de religio por svediaj civitanoj nur en 1951.)

1917 Judoj ricevas plenajn civitajn rajtojn en Finnlando.

Oni taksas la nombron de jidparolantoj en Svedio al tri mil kvincent, dum la judoj, laŭ iu difino, estas dudek kvin mil. Alia takso estas ke kvin mil ĝis ses mil iom uzas la lingvon (Hyltenstam 1999:322). Tamen neniu persono en Svedio estas unulingvulo en la jida. Estas sekve problemo por la lingvistoj difini la lingvokomunumon, kaj mia fonto, Hyltenstam (1999), enhavas interesegan ĉapitron pri tiu demando. La problemo tute similas al la problemo decidi kiom da esperantoparolantoj ekzistas. En la tuta mondo, laŭ SIL, kiu citas J. A. Fishman (1991:194), estas tri milionoj aŭ pli da parolantoj de la jida. El ili 1 250 000 loĝas en Usono (1991), 215 000 en Israelo (1986) kaj 49 890 en Kanado (1971). En la teritorio de la eksa Sovetunio eventualaj parolantoj de la jida povas esti 701 000 en Ruslando, 634 000 en Ukrainio, 231 000 en Belrusio, kaj 40 000 en Latvio (SIL, retpaĝo).

Proksimume cent libroj en la jida estas publikigitaj en ĉiu jaro en la mondo (Hyltenstam 1999:323, kiu citas Fishman 1991:333). Kiom da libroj aperas en esperanto ĉiujare?

En Finnlando 1 350 personoj estas membroj de iu el la du judaj paroĥoj; oni taksas al cent la nombron de judoj ne-paroĥanoj. La judoj kiuj venis el Ruslando dum la 19-a jarcento parolis jide kaj ruse; en Finnlando ili ĝenerale elektis la svedan; ĝis 1930 fakte ĉiuj. Nun ili parolas la finnan kaj la svedan. Oni ankoraŭ diskutas inter la finnlandaj judoj ĝis kiu grado la du konvencioj estos aplikeblaj al la judoj kiel malplimulto kaj al la jida kiel malplimulta lingvo.

9. La alandaj insuloj 1917–1921

Alando konsistas el sesmil kvincent insuloj, el kiuj okdek estas loĝataj. Dudek kvin mil personoj vivas tie.

El la historio

1917 08 20 Kunveno de loĝantoj postulas re-aliĝon de Alando al Svedio. La fakto ke tio okazas antaŭ la sendependiĝo estas la formala bazo por la decido entute trakti la postulon.

1917 11 07 La Oktobra revolucio en Ruslando.

1917 12 06 Finnlando sendependiĝas.

1918 01 28 Enlanda milito en Finnlando komenciĝas.

1918 06 13 Alando fariĝas propra departemento de Finnlando.

1918 11 09 La alanda konsilio (Landstinget) vizitas la reprezentantojn de la *Entente*-ŝtatoj en Stokholmo. Oni postulas referendumon kaj apogas la argumentadon sur la 14 punktoj de Wilson.

1918 12 28 La alanda gvidanto Julius Sundblom petas liberiĝon for de sia parlamenteco – sed veturas al Parizo.

1919 01 31 Julius Sundblom, Johannes Eriksson kaj Johan Jansson postulas referendumon ĉe la Packonferenco kaj ties *Conseil Suprême* 'Supera Konsilio' en

Parizo. (Ili estas unulingvuloj; ili parolas nur la svedan, kaj la afero eble suferas pro tiu fakto.)

1919 Parizo kaj Londono klopodas forigi la demandon for de la packonferenco al la Societo de la nacioj en Ĝenevo.

1920 06 04 Rafael Erich, ŝtatministro de Finnlando, proponas aŭtonomion al Alando – rifuzita de la alandanoj.

1920 11 06 La reprezentanoj de la Societo de la nacioj, E. Beyenes (Belgio) kaj F. Calonder (Svislando) alvenas al Stokholmo; Abram I. Elkus (Usono) la 15-an. Poste ili veturas al Helsinki, pli poste al Alando, por esplori la aferon.

1921 04 16 La opinio de la tri komisiitoj fariĝas konata. Kvar novaj kondiĉoj, aldone al la aŭtonomio: (1) la sveda estu la sola lingvo de instruado; (2) tero aĉetita de eksteruloj povu esti reaĉetita de alandaj aŭtoritatoj; (3) enmigrintoj ricevu voĉdonrajton nur post kvinjara restado; kaj (4) la prefekto de la departemento estu nomumita nur se apogita de alanda instanco.

1921 06 05 Sundblom kaj Carl Björkman estas arestitaj.

1921 06 24 Decido de la Societo de la nacioj (*League of Nations, La Société des Nations*). Ĉiuj tri ricevas ion: Alando ricevas aŭtonomion ene de Finnlando kun garantio de ĉiama unulingveco; Finnlando konservas Alandon ene de siaj limoj; Svedio ricevas senarmilan, neŭtralan najbaron.

1921 09 02 Sundblom kaj Björkman estas kondamnitaj al dekokmonata karcero. Ili ricevas gracon de la registaro en oktobro kaj estas liberigitaj.

1995 12 31 Sur la insuloj de Alando vivas 25 202 personoj el kiuj 23 732, do 94,2 procentoj, estas svedlingvanoj; komparu kun 294 664 svedlingvaj finnlandanoj entute. La finnparolanta malplimulto havas malpli da rajtoj ol la finnparolantoj en Svedio.

1999 12 08 Seminario pri Alando en Ĝenevo. La ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj nacioj, Kofi Annan, kaj la prezidanto de Finnlando, Martti Ahtisaari partoprenas. La organizantoj esprimas la sinceran esperon ke la kazo de Alando povos inspiri aliajn provi pacajn kaj daŭrajn solvojn de iliaj konfliktoj.

La israela polico vizitis Alandon por studi la alandan polican organizaĵon. La propono de la Unuiĝintaj nacioj por solvi la konflikton en Jugoslavio estis parte inspirita de la modelo de Alando.

Post okdek jaroj la solvo de la internacia konflikto daŭras kaj bone funkcias. Ĝi ankoraŭ havas intereson kiel modelo de paca solvo de konfliktoj, kiel montras la seminario en Ĝenevo. Se oni tradukas la konflikton en modernajn terminojn, estas kiel se Kosovo postulus aliĝon al Albanio, kaj la Unuiĝintaj nacioj nomumus tri personojn por proponi solvon, kaj Kosovo restus ĉe Jugoslavio kun garantiita aŭtonomio . . . tute sen armiloj.

Dum la tuta alanda konflikto, dum kvar jaroj, de 1917 ĝis 1921, eĉ ne unu kuglo estis pafita.

10. Opinioj, tezoj, konkludoj

Kiu estas la diferenco inter lingvo kaj dialekto? Ĉu ekzistas lingvistika difino? La ekzemploj de la samea kaj de meänkieli indikas ke la respondo al la lasta demando estas nea: nur politika difino eblas.

Ĉiuj lingvoj en Svedio kaj Finnlando estas lingvoj de malplimultoj – nome en la monda vilaĝo. Tamen kelkaj estas pli malplimultaj ol aliaj. Du lingvoj estas fortaj laŭ relativa skalo, la finna kaj la sveda. Ili estas la ĉefaj lingvoj ĉiu en unu ŝtato, dum la aliaj estas traktataj kiel malplimultaj lingvoj en tiuj du ŝtatoj. Kiam mi estis en la lernejo mi lernis de mia instruisto pri filozofio ke etnaj malplimultoj estas *ĉiam* kaj *ĉie* priluktataj de la plimulto ĝis kiam ili ne plu estas danĝeraj por la plimulto. Tiam oni ja povas ĉesi la luktadon kontraŭ ili kaj eĉ iom helpi ilin, ĉar estas agrable havi ilin kiel oni havas zoologian ĝardenon kun ekzotaj bestoj aŭ muzeon kun interesegaj muzeaĵoj. Temis tiam pri la sameoj de Svedio kaj la nordamerikaj indianoj. Eble kiel juna knabo mi ne plene komprenis tion. Sed nun mi memoras tiujn ŝokajn vortojn, kaj mi demandas min ĉu ne la zorgoj montritaj de la Konsilio de Eŭropo estas signo ke la etnaj malplimultoj ne plu estas danĝeraj.

Kaj, kiel mi diris, centoj da lingvoj estas nun parolataj en la du landoj. En lerneja klaso la infanoj povas paroli dudek diversajn lingvojn, en lernejo sesdek. En Svedio ĉiu rajtas havi iom da instruado en sia gepatra lingvo. Tamen la ĝenerala instruado estas en la sveda. Ni ankoraŭ ne vidis la tutan evoluon de tiu afero.

Kio estas malplimulto? Ekzemple serboj kaj grekoj ne estas konsiderataj kiel malplimultoj, kvankam ili estas multe pli nombraj ol jidparolantoj aŭ sameoj. Oni povas nur demandi sin kiom longe povas daŭri la nuna sistemo de klasado de homoj.

La sameoj ne loĝas nur en la nordo. Plej multaj loĝas en Stokholmo, la ĉefurbo. Finnparolanto en Stokholmo povas paroli finne en la hejmo, aŭskulti finnajn radioelsendojn kaj vidi finnajn televidajn programojn, paroli svede sur la strato kaj angle en la laborejo. Kiel kalkuli tian homon?

Oni nomas korologion la studon de spaca distribuo de iu afero, ekzemple de mineraloj. La korologio de lingvoj mi do iom prezentis al vi, montrante mapojn de la iama aŭ nuna distribuo de lingvoj.

Mi tezumas. La ĝisnuna mondrigardo de lingvoj kaj dialektoj parolataj en diversaj provincoj, teritorioj kaj ŝtatoj devas cedi al rigardo de lingvoj uzataj en diversaj sciokampoj, sociaj tavoloj, en la abstrakta spaco de interreto, populare *cyberspace* 'kiberspaco'. Tial la sveda kaj finna lingvoj, iam ŝtataj lingvoj en ŝtate estrataj teritorioj, fariĝas lingvoj de malplimulto en planedo dividita ne per geografie aŭ politike difinitaj limoj, sed en abstrakte difinitaj sciokampoj kaj sociologie difinitaj sociaj tavoloj. Homoj parolas, laŭ la situacioj, diversajn lingvojn: unu hejme, unu laboreje, unu enurbe.

La korologio de lingvoj pli kaj pli malsimpliĝas.

Referencoj

Hyltenstam, Kenneth (red.) (1999): *Sveriges sju inhemska språk – ett minoritetsperspektiv* [*La sep indiĝenaj lingvoj de Svedio – el perspektivo de malplimulteco*]. Lund: Studentlitteratur.

Lundén, Thomas (1993): *Språkens landskap i Europa* [*La lingva pejzaĝo de Eŭropo*]. Lund: Studentlitteratur.

Melander, Björn (1997): "De små språken i den europeiska gemenskapen [La malgrandaj lingvoj en la eŭropa komunumo]". *Språk & Stil* 7:91–113.

Rosenfelder, Mark: *Numbers from 1 to 10 in over 4000 languages* *URL:* `http://zompist.com/numbers.shtml`

SIL International: *Ethnologue, top 100.* *URL:* `http://www.sil.org/ethnologue/top100.html`

Svanberg, Ingvar; Runblom, Harald (red.) (1989): *Det mångkulturella Sverige. En handbok om etniska grupper och minoriteter* [*La multkultura Svedio. Manlibro pri etnaj grupoj kaj malplimultoj*]. Stokholmo: Gidlunds bokförlag; La Centro por multetna esploro ĉe Upsala universitato. 492 pp.

Svedia parlamento (1974): *Regeringsformen* [*Konstitucia leĝo*] 1974:152.

Svenska språknämnden (1998): *Förslag till handlingsprogram för att främja svenska språket* [Propono pri aga programo por akceli la svedan lingvon]. *Språkvård* 1998:2:7–23. *URL:* `http://www.spraknamnden.se/SSN/handl.htm`; traduko en la anglan [*Draft Action Programme for the Promotion of the Swedish Language*] ĉe `http://www.spraknamnden.se/SSN/handleng.htm`

Teleman, Ulf (1993): "Det svenska riksspråkets utsikter i ett integrerat Europa [La pespektivoj de la sveda regnolingvo en integrita Eŭropo]." En: Blomqvist, Jerker & Teleman, Ulf (red.): *Språk i världen. Broar och barriärer* [*Lingvoj en la mondo. Pontoj kaj bariloj*], pp. 127–141. Lund.

Adreso de la aŭtoro: Upsala universitato, Matematika instituto,
Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio.
Telefono: +46 18 4713216 (oficejen); +46 18 300708 (hejmen) Faksilo: +46 18 4713201
Retpoŝta adreso: `kiselman@math.uu.se` URL: `http://www.math.uu.se/~kiselman`